

Mensual
Numéro 65
Juin 2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €



Unika ZEO sub la maro !

La plej okcidenta parto de duoninsulo Krimeo - duoninsulo Tarhankut - estas unika loko de belegaj golfetoj, kie la fundo estas travidebla je 12 metroj. Tie estas subakva muzeo. Komence de la «rekonstrua periodo» en Sovetunio oni ofte forĵetadis bustojn de bolŝevikoj. Subakvistoj aranĝis tie en la maro «aleon de bolŝevikoj», poste aleon de eminentaj personoj kaj rezulte aperis unika subakva muzeo.

En la jaro 2008 ĝuste apud tiu loko okazis ukrainia-rusia E-renkontiĝo IET-1 (Internaciaj Esperantaj Tagnoktoj), kiun partoprenis ĉ. 180 esperantistoj. Dum la renkontiĝo la partoprenantoj solene inaŭguris Esperanto-Aleon, en kiu la unuaj bustoj estis tiu de Zamenhof kaj fama blinda esperantisto, vojaĝanto, verkisto Vasilij Eroŝenko. La 20-kilogramajn 45-centimetrajn bustojn kreis konata skulptisto Sergej Fjodorov.

Ĉi-jare komence de julio en la sama loko okazos IET-2, dum kiu en la Esperanto-aleo aperos tria busto - de fama Esperanto-pioniro, svedo Valdemar Langlet: unua E-vojaĝanto, unua prezidanto de Sveda E-Federacio, redaktoro de la dua E-gazeto «Lingvo Internacia», fondinto de dua en la mondo E-klubo kaj... unua internacia esperantista geedziĝo. Ne preterlasu eblecon partopreni IET-2 (01-10 de julio 2010).

Pliaj informojn dezirantoj povas trovi ĉe <http://esperanto.net/iet2010/>

Jefim Zajdman

Fonto: Ret-info (<http://www.eventoj.hu/>)

(vidu tradukon interne,
en la franclingva Suplemento)

Kongresfoto



3-6an de aprilo 2010 en Hillono - Bretonio

Se vi ĝin forgesis sen prifajfi,
se vi timis manki vian trajnon pro striko de kamaradoj, kiuj bataladas pri publikaj servicoj,
se vi trinkis kiam Alano fotis nin, sed nepre volas vidi vian preferatan samidean(in)on
se vi bedaŭregas ne jam mendi vian kongresfoton 2010,
eblas tuj peti de ni tiun memoraĵon el Hillono, nepre antaŭ la 30a de junio 2010.

Sendu vian mendon kun 5 € al:

OKK SAT-Amikaro 2010 –
ESPERANTO 22
chez Alain LE MAU
9 rue de St Aubin
22120 YFFINIAC

El nia leterkesto



Kaj mi ne ripetos!

Lino Markovo

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo Andrio	Guy Martin
Jean-Louis Carré	Pierre & Rolande Neudellec
Mari-elen' Dezer'	Jean Selle
Ĵak Le Puil	Sergo Sir'
Franjo Leveque	Juliette Ternant
Lino Markovo	Hiliona OKK
Vinko Markovo	Cercle Bitérois d'Espéranto
Vito Markovo	

Raporteto

Atentigo: ĉi teksto kompletigas la agadraporton aperintan en LS63 (marto 2010) k do vole ne ripetas informojn, kiuj jam aperis tie.

Unua laborkunsido

Prezidis Ĵak' LePuil'

Agadraporto 2009

Pri membraro: estis reemfazite, ke gravas plu membrigi homojn. Plimulto el la membraro estas inter 50- kaj 70-jara kaj venos ia generacia truo, kiun ni devas plenigi.

Pri komitato: estis bedaŭrate, ke la prezidanto ne ĉeestas la kongreson k klarigite, ke pro personaj problemoj li momente estas malhelpata agadi. Post la kongreso okazis do ŝanĝo de prezidanto (post interakordo de ambaŭ anstataŭanto k anstataŭato, do nun prezidas Gi' Kavaljero (Guy Cavalier)) tiel ke la gravaj administraj taksoj (ĉefe akiron por la kasisto de subskribrajto) ĝis nun pendantaj plej rapide finplenumiĝu. Tio estas nun sur bona vojo al solviĝo.

Pri libroservo: pozitive notinde, ke estas pli da libroj en la katalogo. Reaperis en la katalogo ekzemple broŝuroj de Kribo. Konsilite, ke se vi aĉetas libron en esperanto, nepre aĉetu ĉe nia libroservo, ĉar la monon ni bezonas eĉ se nur por plufunkciigo de la servo. Tiel vi subtenas la asocion.

Pri lokaj perantoj: plu endas pli precize k regule indiki la lokajn kursojn kaj aktivaĵojn. Ĉiuj, kiuj konstatas mankon de peranto en sia regiono pripensu kiel krei grupeton k kiun havi kiel referenculon. En lasta SAGO raporto pri loka kunveno en Bretonio estas imitinda ekzemplo. Pere de la referendumiloj estas kontaktitaj unuope homoj por pli efike k konkrete klopodi tiudirekte.

Pri La Sago: ĝis nun sufiĉe bone fartas kaj aperas akurate, sed tamen oni ne subtaksu, ke la skipo estas ege eta. Funkcias per kvar homoj. Andreo Andrio zorgas ankaŭ kiel korektanto. Same Ĵak, kiu prizorgas recenzan rubrikon, ankaŭ estas efika kontrolanto. Plie ĉefe Vito nutras la francan parton kaj faras simplan finan kontrolon. Kaj Sergo, kiu estas neforlasebla, zorgas pri enpaĝigado k kunordigas la tuton. Se li malsaniĝos, La Sago simple riskas ne plu povi aperi (do manko de "kromrado"). Konsciu ke nepre estu aliaj homoj, kiuj helpu, ĉar ni ne estas sufiĉe nombraj. Precipe por la franca suplemento, kiu estas ege peza laboro, helpo estas vere bezonata.

Pri helpado al Afrikanoj: pakoj estas sendataj al Burundio, Benino, Ugando, Kongolando kaj Togolando.

Voĉdonado pri la agadraporto: Por=45, Kontraŭ=neniu, Sindeteno=3. aprobita de la kongreso.

Filmo

Ni celas, ke la filmo estu prezentbla en Seto paske 2011. La filmado mem daŭros ĝis

Kongreso 2010 en Hiliono: pri la kongresaj laborkunsidoj

Jen konciza versio de la kongresa raporto. Ĝi celas diskonigi la ĉefajn okazaĵojn k agadproponojn por la estonteco. Pli detala protokolo estos disponigita ĉe la jena adreso: <http://www.esperanto-sat.info/article1703.html>

septembro. Planite estas traduki la filmon en kiel eble plej multaj lingvoj. Dublado por 7 lingvoj, pere de profesia entrepreno. 6 lingvoj de UNO plus Eo. Laŭeble plej multe da subtitolaj versioj (ĉ. 30). Celo estas havi ion utilan planedorskale. Estus bonege havi la DVD vendopretan jam en marto, aŭ plej malfrue por la someraj kongresoj. Graveco de efika disvastigado de la produkto (disvendo-plano). Necesas apogi sin sur la esperantian disvendoreton. Etaj kinejoj sufiĉe bone funkcias kun ĉi tiuj projektoj, kiuj ebligas organizi debatojn poste. Antaŭmendo jam ebla unuope kontraŭ 18 €.

Dua laborkunsido

Konsistis el kvar laborgrupoj, pri kiuj estis raportite dum la tria laborkunsido.

Tria laborkunsido

Prezidis Robin' Beto

Financa raporto 2009

Ĉi jare granda ŝanĝo estas enposteniĝo de nova kasisto. Omaĝado al la 35-jara sindona ofikado de Andreo Sadiero. Graveco provi taksi la kvanton da bonvolula laboro plenumata en la asocia vivo (gravas por ricevi subvencioj, kiel montriĝis por Hiliona kongreso). Librostoko devas esti pli precize retaksita por pli bone koni, kiom ĝi valoras el financa vidpunkto (k tio relativigos la profiton de la libroservaj vendoj).

Voĉdonado pri la financa raporto: Por=neta plimulto, Kontraŭ=neniu, Sindeteno=unu. Aprobata de la kongreso.

Buĝeto 2010

Financaj aferoj valoras nur por subteni la politikon de la asocio. Mono estas unu el la iloj por atingi nian celon. Necesas mono por helpi tiujn, kiuj deziras varbi. Proponas buĝeton de 3000 eŭroj por regione agadi, kiu fariĝu surbaze de ia «kontrakto», por ke almenaŭ unufoje jare la monhelpitaj membroj raportu por la SAGO kaj antaŭ la komitato pri la agadoj k atingoj ebligataj per tiu mondisponigo...

Konsultocela voĉdono pri tiu buĝeto: Por=neta plimulto, Kontraŭ=neniu, Sindeteno=5.

Komitato 2011

Rekandidatas la sama skipo kiel por 2010: Fil' Giĉeto (Phil Guichet), Maksimiliano Gverino (Maximilien Guérin), Veroniko Jirar' (Véronique Girard), Gi' Kavaljero (Guy Cavalier), Vito Markovo (Vito Markov), Gi' Marteno (Guy Martin), Dominiko Simeono (Dominique Siméone).

Raporto pri laborgrupoj:

1. Loka agado

Inter 5 kaj 30 ĉeestantoj. Ĉefe parolis pri Bretonia agado. Esprimiĝis membroj de la bretona federacio pri komuna agado por ĝisdatigo de la informoj pri la kluboj. Propono starigi komunan datenbazon por kolekti ĉiujn informojn. Proponiĝis, ke la regionaj federacioj ankaŭ ricevu partojn de la kotizoj de SAT-Amikaro. La komitato esploras kiel ordigi plej taŭge k efike tiun kunlaboron. Havi komunan interasocian retejon por anonci ĉiujn e-aranĝojn (k ĉefe esperanto-kursojn) k kolekti gazetartikolojn estas jam principe akceptita afero jam de UFE k SAT-Amikaro (k certe la aliaj asocioj ankaŭ favoras). Necesas nun konkrete realigi tion.

2. La Sago

Kerna problemo restas eteco de la skipo. Plu serĉata kromenpaĝiganto (notinde por la FrSup, kiu povas esti prizorgata sendepende de la cetero de la revuo, eĉ per alia programo, kiel ekzemple Skribuso). La suplemento plu estas la plej tikla punkto, ĉar ĝi direktiĝas al neesperantistoj (rolas kiel varbilo) sed estas redaktita de e-istoj, kiuj ne nepre konas la atendojn de la celata publiko. Invito do notinde al komencantoj k freŝalvenintoj kontribui al ĝia nutrado k plibonigo.

3. Rilatoj kun neesperantistaj frat-movadoj

Multaj SAT-Amikaranoj prezentis siajn agadojn en diversaj neesperantistaj asocioj: movado kontraŭ prostituado en Eŭropo, Ruraj familioj, Turisma asocio, regionaj verkistoj, SIL, sciinterŝanĝaj retoj, mondĉivitanoj, amnestio internacia, Bretonio-Gorazde, radiofonio, Amikaro de Pariza Komunumo. Invito al ĉiuj varbi pri esperanto en tiuj medioj k informi pri en La Sago (ĉu france en la suplemento, ĉu rekte en eo, laŭ prefero).

4. Rilatoj kun Franciaj E-kulturcentroj

Post rapida prezento far reprezentantoj de Greziljono kaj Kvinpetalo montriĝis, ke ambaŭkaze estas strebo konservi sian lokon. Levitaj demandoj pri la bezonco de la centro. Tamen ĝenerale deziro konservi ilin. Momente kandidatiĝo de SAT-Amikaro al Greziljona komitato sub rezervo.

Voĉdono pri kandidatiĝo de SAT-Amikaro en Greziljono: Por=36, Kontraŭ=3, Sindeteno=9. Aprobite de la kongreso. Posta ŝtupo do estos ratifo (aŭ ne) okaze de la referendumo, se entute SAT-

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo Unika ZEO sub la maro...
 - 2 Kongresfoto El nia leterkesto
 - 2-3 Raporteto pri kongresaj laborkunsidoj
 - 4 Libro vivas pli ol ...
 - 5 Praktikaj informoj
 - 5-6 Kiel traduki: «Foyer»
 - 6 Libro-Servo Selle-humuraĵoj
- Supplément en français**
- 7 Un singulier ZEO
 - 8-9 Dans la presse... Cours et stages
 - 10 Culture
 - 11 **Adhésion 2010** Setece kuiru!
 - 12-13 Kontrolata socio (1a parto)
 - 13-14 Eĥoj el Hiliono
 - 15 Esperantistoj aktivas: Unua IKoFo
 - 16 Unua de majo, dise ĉie BildDeliraĵo: Ĉe la lago 65

Amikaro elektiĝos intertempe (baloto je 31/05).

Etikaj bankoj k SAT-Amikaro

Estis proponite rezolucio por ke la komitato pristudu la celojn de aliaj pli etikaj bankoj (ol nuna Poŝta Banko) kaj antaŭvidu nur post venontjara kongresraporto eventuale enmeton de parto el la mono de SAT-Amikaro...

Voĉdonado pri la rezolucio: Por=30, Kontraŭ=2, Sindeteno=2.

Venontaj SAT-Amikaraj kongresoj

2011 en Seto (34): Interasocio Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo

La OKK jam laboregas de novembro 2009 por prepari imponan kongreson. 300 kongresanoj antaŭviditaj. Ĉiunataj preparkunvenoj. Ampleksa retejo jam konsultebla (<http://esperantosete2011.fr/>) kun unua aliĝilo elŝutebla. Kongresmarkoj jam ekdisvenditaj dum ĉi kongreso.

2012: neniu firma propono ĝis nun. En Aosta Valo fakte ne eblis pro tro altaj restad-kostoj.

Kompil-resumo, el notoj dumkongrese kaptitaj de Vinko Markovo, far la sekretario: Vito Markovo.

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Rigardante malantaŭen (en la jaro 2000)



R i g a r d a n t e malantaŭen (en la jaro 2000), romano de Edward Bellamy, el la angla tradukis C.M. Hamaker. Enkonduko de Humphrey Tonkin. Dua eldono. La unua eldono aperis en 1930. Serio Utopia numero 1, Bero, Roterdamo 2005, 204 paĝoj, 13,80 €.

Krom malnovaj SAT-anoj, malmultaj aŭdis pri Bellamy.

Ja en SAT ekzistis (ĉu as?) la Abundana frakcio, kaj sub *Frakcio Bellamy* oni povis legi: «sama kiel 'Abundanoj'». Mi

foje legis la francan revuon de la abundanoj, simpatia revuo cetere, sed mi ne speciale havis emon legi prozon de tiu movado. Kaj jen la tute streĉa, amuza, utopia romano, kiu iĝis poste referenco por la abundanoj.

Nia heroo, Julio Vestio, 30-jara, endormiĝas en la jaro 1887 (ja!) kaj vekigiĝas en la jaro 2000. Ne en nia ĵus pasinta jaro 2000, sed en kvazaŭ perfekta mondo, kie ne plu ekzistas mono, do ne plu riĉuloj kaj malriĉuloj, kie la kvardekkvinjaruloj estas sendevigataj de plua servado al la nacio, kie eĉ ne plu estas pluvombreloj, dank' al trotuar-

kovriilo... kiuj ebligas al la sinjorinoj aperi bele vestitaj malgraŭ forta pluvoventego! Komprenoble en tiu perfekta mondo ne plu ekzistas frenezaj ŝtatestroj aŭ gangsteroj, kiuj ne tre klare vanuis... sed uŝ! ne malestas amo. Mi varme rekomendas ĉi tiun libron, kiu montras, miksitajn kun la romaneca utopio, multajn absurdajn flankojn de niaj socioj, kiu montras kiel racie organizita socio povus kontribui al pli justa kaj agrabla vivo... Ni rajtas revii, ĉu ne?

Jak Le Puil,
LKK 115, jul. aŭg. sept. 2005

Jen nun ekstrakto, kiu memorigas min pri diro de mia patrino: «Ne ekzistas stultaj laboroj, ekzistas nur stultaj homoj!» Ĉi tie D-ro Leteo klarigas al nia heroo, kiu ĵus diris ke en sia mondo kelnero estis «malinda pozicio» en la socio, ke tiu esprimo jam elmodiĝis

«... vi devas scii, ke nuntempe estas etika aksiomo, ke akcepti de aliulo servon, kiun ni rifuzus en kazo de neceso sammaniere redoni, estus kvazaŭ pruntepreni kun la intenco ne repagi; kaj profiti ies malriĉecon aŭ malhavon por devigi lin al plenumado de tia tasko ni konsiderus krimo, same aĉa kiel perforta ŝtelado. Estas la plej fia flanko de iu sistemo, kiu dividas la homojn, aŭ ebligas ilian dividiĝon en klasojn kaj kastojn, ke ĝi malplifortigas la senton pri sameco kiel homoj. – Malegalaj materiaj vivkondiĉoj kaj ankoraŭ pli fortmezure malegala eblo pri instruiĝo kaj kulturiĝo dividis la viatempnan socion en klasojn, kiuj multrilate konsideradis unuj la aliajn kiel diferencajn rasojn. La diferenco inter via kaj nia pensmanieroj pri ĉi tiu demando de servado, tamen ne estas tiel granda, kiel ŝajnas. Gesinjoroj el la kulturita klaso en via tempo pensadis ĉirilate koncerne siajn samklasanojn, same kiel ni pensas koncerne ĉiujn. Ili konsideris la malriĉulojn kaj malklerulojn kiel homajn specojn malsamajn al ili mem. La egalaj materia stato kaj

eblo pri kulturiĝo simple faris nin ĉiujn anoj de unu sama klaso, kiu respondas al la plej bonstata en via epoko. Nur post efektiviĝo de tiu ekonomia egaleco, la ideoj pri solidareco kaj pri interfrateco de ĉiuj homoj povis fariĝi la reala konvinkiĝo kaj praktika gvidilo en sociaj aferoj, kiaj ili estas nun. En via tempo, oni uzadis la samajn terminojn, sed nur kiel frazojn».

«Ĉu la kelneroĵ ankaŭ estas volontuloj?»

«Ne» respondis D-ro Leteo. «La kelneroĵ estas junuloj el la ankoraŭ ne enklasigita laborantaro de la industria armeo, kiujn oni povas ŝarĝi per ĉiaj taskoj ne specialan lertecon postulantaj. Servi ĉe manĝotablo estas unu el ĉi tiuj kaj ĉiu freŝa rekruto devas fari tion kelktempe. Mi mem antaŭ 40 jaroj, dum pluraj monatoj, servadis kiel kelnero, en ĉi tiu sama manĝo-domo. Mi ripetas, bonvolu pripensi, ke ni konas neniun diferencon de digno inter la diversaj specoj de laborado, kiujn la nacio postulas. La laboranto neniam estas konsiderata, nek de aliuj nek de si mem, kiel servisto de tiuj al kiuj li servas kaj li neniel dependas de ili. Li ĉiam servas nur al la nacio. Ni vidas neniun

diferencon inter la laboro de kelnero kaj tiu de iu ajn alia laboranto. La fakto ke li servas rekte al personoj estas tute indiferenta el nia vidpunkto. La ofico de kuracisto estas samspeca, ankaŭ rekte al persona servado, sed mi ne pli multe atendas ke la kelnero malestimos min, pro tio ke mi servas al li kiel kuracisto, ol mi emas malestimi lin, pro tio ke li servas al mi kiel servisto.

Do ekde nun ne plu salutu vian kuraciston per «Bonan tagon, doktoro», krom se li salutis vin per «Bonan tagon, laboristo!» Aŭ faru kiel mi kaj tutsimple diru «Bonan tagon, sinjoro»...

Jak Le Puil



Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-horoj	Marde	10h00 - 16h00
	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun duan merkredon** de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro
CCP: 37 852 90 L La Source.

(Ĉekoj al la kasisto : Guy Martin)
IBAN, (por pagi el eksterlando):
SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314
BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Gladly :
Bankkonto N° 750-6373051-18
IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :
Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir' (ne tajpitaj kontribuaj publikblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : www.sat-amikaro.org

Reto: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto : claud.gerlat@orange.fr

Claude Gladly : Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin : 3 rue Voltaire 22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki Foyer

Foyer estas unu el tiuj franclingvaj nomoj, kiuj havas plurajn sencojn, do plurajn tradukojn en esperanto, precipe **fajrujo**, **hejmo** kaj **fokuso**, sed ankaŭ aliajn.

■ La unua signifo estas tiu parto de kameno, forno, stovo k.a., destinita por enteni fajron, do la plej komuna traduko estas **fajrujo** :

Le foyer de cette cheminée est très propre.

La fajrujo de tiu kameno estas tre pura.

Le foyer d'une chaudière.

La fajrujo de hejtkaldrono.

Le foyer d'une locomotive.

La fajrujo de lokomotivo.

Cette hutte avait un foyer au centre et un trou pour la fumée dans le toit.

Tiu kabano havis fajrejon en la centro kaj fumtruon tra la tegmento.

■ Dua grupo da signifoj estas etendo de la unua al la loĝejo entenanta la fajrujon, do al la familia restadejo, la **hejmo**, ankaŭ al lokoj hejmecaj, kaj eĉ al la homoj vivantaj en sama hejmo. Jen diversaj ekzemploj :

Les nomades et les vagabonds n'ont pas de foyer.

La migruloj kaj vaguloj ne posedas hejmon.

Un soldat qui rentre dans ses foyers.

Soldato, kiu revenas hejmen ; ... kiu rehejmiĝas.

Émilie est une femme au foyer.

Emilio estas ĉehejma virino.

Pierre est rattaché au foyer fiscal de ses parents.

Petro apartenas al la fiska mastrumo de siaj gepatroj.

Jean a fondé un foyer.

Johano edziĝis.

Oni ne ĉiam traduku «*Femme au foyer*» per «*Ĉehejma virino*» Tio grandparte dependas de la kunteksto.

Ĉu vi konsentas edziniĝi kun mi ?

Bremsu vian flamecon !

Mi, virga, sed ne naiva !


Oni ja scias, ke vi celas nur skrapi la kamentojn...

Cetere, mi flamiĝos nur por reĝo ne por burĝo !

Ekzemple :

Landru
Hejtisto

Johanino de Arko
Virga amazono



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
Sabate 11H-18H)
Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
Al ĉiu mendo
aldonu:
40 % ĝis 5 €
35 % ĝis 10 €
25 % ĝis 20 €
20 % ekde 20 €

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Un foyer d'étudiants. **Studenthejmo.**

Pendant l'entracte les spectateurs peuvent boire au foyer du public. **Dum la interakto la spektantoj povas trinki en la publika fojro.**

Les acteurs se retrouvent au foyer des artistes. **La aktoroj kunvenas en la aktora fojro.**

■ En tria grupo da ekzemploj, la vorto montras lokon, en kiu koncentriĝas la lumo, sed ankaŭ iu ajn fenomeno; tiaokaze ĝi ofte tradukiĝas per **fokuso**:

Les rayons du soleil traversant une lentille convexe convergent à son foyer. **La sunradioj, trapasinte konveksan lenson, konverĝas al ties fokuso.**

Certains portent des lunettes à double foyer. **Iuj homoj portas dufokusajn okulvitrojn.**

Un puissant foyer lumineux. **Potenca lumfonto.**

Une ellipse a deux foyers. **Elipso havas du fokusojn.**

Un miroir parabolique concentre la lumière du soleil à son foyer. **Parabola spegulo koncentras la sunlumon al sia fokuso.**

Les pompiers recherchent le foyer de l'incendie. **La fajrobrigado serĉas la fokuson (aŭ la ekbrulejon) de la incendio.**

La police doit identifier le foyer de la révolte. **La polico devas trovi la fokuson (aŭ la kovejon) de la ribelo.**

Il faut trouver le foyer d'infection pour soigner efficacement. **Necesas trovi la infekto-fokuson por efike kuraci.**

On trouve des foyers de misère dans beaucoup de pays. **Troviĝas mizerejoj en multaj landoj.**

■ Kiam **foyer** tradukiĝas per **fokuso**, oni trovas la derivitan adjektivon **focal** kaj la verbon **focaliser**; tiu verbo estas uzata ankaŭ en figura senco. Jen kelkaj ekzemploj:

La distance focale d'une lentille. **La fokusa distanco de lenso.**

Focaliser les rayons lumineux sur l'écran. **Enfokusigi la lumradiojn sur la ekrano.**

Focaliser l'attention du public sur cela. **Koncentri la atenton de la publiko sur tio.**



Andreo Andrio

Selle humuraĵo



Liberalisma logikeco.



Medicina turismo en Hindio.



Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Un singulier ZEO* sous-marin



La presqu'île de Tarkhankut, située à l'extrémité ouest de la péninsule de Crimée est un site unique avec ses magnifiques criques aux eaux transparentes permettant de voir le fond à 12 mètres.

C'est là que se trouve un musée sous-marin, né au début de la «Perestroïka» soviétique. A cette époque on jetait souvent des bustes de bolcheviques. Des plongeurs sous-marins ont alors eu l'idée d'installer ici une «allée des bolcheviques» sous la mer, puis une allée des grands personnages et il en est résulté un musée sous-marin unique en son genre.

C'est précisément près de cet endroit que se sont rencontrés en 2008 quelques 180 espérantistes russes et ukrainiens dans le cadre des premières Journées Internationales d'Espéranto «IET-1».

Au cours de cette rencontre les participants ont inauguré solennellement une Allée de l'Espéranto dont les premiers bustes étaient ceux de Zamenhof et d'un célèbre espérantiste

aveugle, voyageur et écrivain: Vassiliï Eroshenko. C'est Sergueï Fiodorov, un sculpteur connu, qui a réalisé ces bustes de 45 centimètres pesant 20 kilogrammes.

La 2e édition de ces rencontres, «IET-2», qui aura lieu cette année au même endroit, verra l'apparition d'un troisième buste: celui d'un célèbre pionnier de l'espéranto, le suédois Valdemar Langlet, premier voyageur espérantiste, premier président de la Fédération Suédoise d'Espéranto, rédacteur du deuxième journal en espéranto «Lingvo Internacia», fondateur du deuxième club d'espéranto au monde et ... l'heureux élu du premier mariage espérantiste international.

Ne laissez pas passer la possibilité de participer à la rencontre «IET-2». Si vous le souhaitez, vous trouverez de plus amples informations sur <http://esperanto.net/iet2010/>

Jefim Zajdman,
traduit de l'espéranto
par J.L. Carré.

Source: Ret-info
(<http://www.eventoj.hu/>)



* ZEO

Un ZEO (Zamenhof/Esperanto Objekto) est un objet commémoratif relatif à l'espéranto ou à son initiateur L.L. Zamenhof. (Voir: <http://fr.wikipedia.org/wiki/ZEO>)

On les trouve un peu partout dans le monde - et même dans l'espace, avec les enregistrements embarqués sur «Voyager 1» et «Voyager 2» - sous des formes les plus diverses :



de l'imposant cargo «Espéranto»...



à la simple plaque de rue....



en passant, en auto-dérision,
par «Zaza, le nain de jardin»...

■ **Le Républicain Lorrain** - 08 mai 2010 - *Le stage d'Espéranto a séduit*



Le stage d'Espéranto, proposé au centre socioculturel Albert-Camus de Nilvange, du 13 au 16 avril dernier, par l'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto et Esperanto Thionville à rassemblé plus d'une dizaine de participants : des cheminots de la région, de Toulouse et de Belgique ainsi que quelques personnes de notre région. Le stage a ravi et comblé les participants par la diversité et la richesse de son programme. Les débutants ont pu découvrir la langue internationale, les plus initiés se sont perfectionnés.

Coté détente, des visites guidées ont été proposées les après-midis, et les soirées ont su joindre l'utile à l'agréable sous forme de conférences ouvertes au public.

Source: <http://www.republicain-lorrain.fr/fr/permalien/article/3101327/Le-stage-d-Esperanto-a-seduit.html>

■ **Yonne républicaine** publie dans son édition du 27 avril un article intitulé



Acticomm présente ses projets où il apparaît que l'association "a ouvert un atelier espéranto".

Pratique. Acticomm 89, 3 rue Ampère, à Migennes.

Ouvert du lundi au jeudi, de 9h30 à 11 heures et de 14 heures à 16h30. Téléphoner avant de se déplacer au 03.86.80.23.79. Adresse courriel: acticomm89_bureau@yahoo.fr

Source: http://www.lyonne.fr/editions_locales/migennois/acticomm_presente_ses_projets@CARGNjFdJSsGFRgABB0-.html

Dans la presse... ... ou ailleurs

■ **Le Télégramme** - 05 avril 2010
- *Espéranto. 230 pratiquants réunis à Hillion*



Hillion accueille, depuis samedi et jusqu'à ce soir, le congrès annuel de Sat Amikaro, une des deux associations espérantistes. À cette occasion, 230 adhérents sont venus de toute la France et même d'Europe. Parmi eux Laurent Peuch, membre actif d'Espéranto 22.

Quel est l'objectif de ce congrès?

- Avant tout l'assemblée générale de l'association francophone de Sat Amikaro. L'occasion de faire le bilan d'activité et de lancer des projets. Mais aussi l'occasion de se rencontrer, d'échanger et pourquoi pas de sensibiliser les gens du coin à l'espéranto.

Connaissez-vous le nombre de personnes qui parlent l'espéranto?

- Il est difficile de donner un chiffre mais je pense qu'ils sont entre 100et 150 dans les Côtes-d'Armor à le parler.

N'est-ce pas décourageant de voir aussi peu de monde le parler?

- Non, car on trouve toujours des espérantistes un peu partout, surtout depuis qu'il y a internet. Il y a environ 4 ou 5 millions de personnes dans le monde qui le pratiquent.

Où trouver des cours?

02.96.63.91.32 pour Saint-Brieuc;
02.96.35.73.06 pour Locquémeau;
02.96.27.67.49 pour Dinan;
08.96.23.02.63 pour Lannion;
02.96.22.70.13 pour Plouézec;
02.96.35.83.25 pour Guingamp.

Source: <http://www.letelegramme.com/ig/generales/regions/cotesarmor/esperanto-230-pratiquants-reunis-a-hillion-05-04-2010-856590.php>

■ **Ouest-France** - 04 mai 2010
- *Cavan: la Ville a reçu l'Étoile verte de l'espéranto*



Anne Désormeaux a remis l'Étoile verte, symbole de l'espéranto, au maire, Pierre-Yves Nicol.

Durant trois jours, l'espéranto a résonné dans les murs de l'école, de la médiathèque et de Ti ar Vro, la maison de la culture bretonne. Initiation à cette langue internationale pour les élèves, exposition, conférence se sont parfaitement déroulées. En point d'orgue, la Verda esperantista stelo, l'Étoile verte à cinq branches, symbole de l'espéranto pratiqué dans les cinq continents, a été remise au maire Pierre-Yves Nicol.

Cavan est plutôt connue pour son rôle important dans la promotion et la conservation de la langue bretonne mais «*le breton et l'espéranto, c'est une vieille histoire*», a expliqué Hélène Caous, espérantiste de Plouézec. En 1930, Ropars Hémon faisait paraître un dictionnaire breton-espéranto. Plus récemment, en 1997, Pierre Denes éditait Brezhoneg buan hag aes, une méthode facile et rapide pour apprendre le breton, à l'usage des espérantistes.

Cette langue, créée à la fin du XIX e siècle par le médecin et linguiste polonais Lejzr Zamenhof, «*nous permet d'être bien ancrés dans nos pays et d'être ouverts au monde: l'apprentissage des autres langues nous est plus facile*», a ajouté Anne Désormeaux, espérantiste cavannaise. Cet été, les espérantistes, réunis en congrès international à Plouézec, pourront s'initier au chinois. L'an dernier, ils découvraient le breton.

Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_-La-Ville-a-recu-l-etoile-verte-de-l-esperanto_-22006-avd-20100504-58156174_actuLocale.Htm

■ **LaDepeche.fr** – 17 mai 2010 - **Verniolle. 40 bougies pour les espérantistes ariégeois**

Jean-Marc Leclercq, inscrit au Livre des records 2000 pour



avoir chanté en 22 langues en concert sur la place du Capitole, à Toulouse, a été accueilli lors des quarante ans du Cercle d'études espérantistes de l'Ariège, présidé par Georges Comte. Ce chanteur multilingue emmena le public dans un tour du monde ponctué d'anecdotes sur ses rencontres, sa famille...

Une chanson, une langue, c'est le principe de Jean-Marc dans cette rencontre extraordinaire avec les espérantistes. De plus, lors de cet anniversaire, les musiciens d'Aigarella ont entraîné toutes les générations dans la danse, du rock endiablé à la polka, en passant par la valse... Riche journée où les bénévoles d'Amnesty International présentaient leur revue «Silence» et leurs nombreuses activités. Sans oublier les petites mains du CEEA qui exposaient les croix occitanes, les étoiles jaunes de l'Europe et vertes de l'espéranto, fleurs de printemps...

Bref, ce fut, comme le dit Georges Comte, «une belle journée de culture, de tolérance et de métissage. Longue vie au Cercle d'études espérantistes de l'Ariège!»

Source: <http://www.ladepeche.fr/article/2010/05/17/836907-Verniolle-40-bougies-pour-les-espérantistes-ariégeois.html>

Cours et stages:

Maisons culturelles: programme estival



Kvinpetalo

L'été arrive dans l'hémisphère nord.

Pourquoi ne pas venir à Bouresse, pour profiter du calme de la campagne?

Le centre culturel espérantiste Kvinpetalo propose plusieurs stages, dont certains ouverts aux débutants:

19-24 juillet Espéranto et tourisme Catherine Kremer

Ce stage a pour but de permettre aux personnes intéressées d'animer une excursion de façon claire et agréable. Les participants pourront enrichir la présentation en apportant des documents touristiques ou des photos au sujet d'une région, d'une ville ou d'un monument. Chacun pourra trouver la façon adéquate de le présenter, avec les mots les plus adaptés (nous étudierons le dictionnaire). Nous nous amuserons en navigant entre l'histoire, l'architecture, les anecdotes, en décrivant, racontant et traduisant si nécessaire... Sur place, nous concrétiserons ce cours par une excursion.

30 juillet – 6 août Traduction (deuxième degré) Claude Gerlat

Claude Gerlat est l'auteur d'une *Petite Grammaire d'Espéranto*, a traduit diverses nouvelles et écrit des histoires originales en espéranto. Le cours contiendra aussi des explications grammaticales, et pourquoi pas des discussions sur la littérature... à moduler en fonction des circonstances et des envies des participants.

10-17 août Stage musical famille Markov

Pendant ce stage, l'espéranto sera pratiqué à travers la musique : chants libres ou à plusieurs voix, musique d'ensemble, discussions sur le contexte des pièces étudiées ou initiation à l'espéranto pour les débutants. Le stage s'achèvera sur un concert, pour lequel un disque-souvenir sera produit. Le stage sera aussi l'occasion d'accueillir un concert exceptionnel de Kajto le 13 août, à l'occasion des 25 ans de la Société Yvonne Martinot (SYM), qui gère le centre Kvinpetalo.

Informations complémentaires: <http://kvinpetalo.org>.

Inscriptions: informoj@kvinpetalo.org

Centre espéranto Kvinpetalo, 15 rue du lavoir, 86410 Bouresse

Informations sur les prochains stages : écrire à moonmont@pt.lu ou téléphoner à : (+) 33 (0) 607 316 781

Le Groupe espéranto du Maine vous invite au concert D' INTERKANT'

Chœur interrégional de 45 chanteurs et musiciens
qui vous présentera 9 poèmes chantés et lus
extraits du

« CANTO GENERAL »

de Pablo NERUDA



mis en musique par Mikis THEODORAKIS

traduit en espéranto par Georges LAGRANGE (ancien enseignant à l'ITEMM du MANS)

Eglise Saint Lazare au MANS

(près de l'usine des tabacs)

Dimanche 13 juin 2010 à 16 h

entrée libre

Pour tout renseignement complémentaire téléphoner au : 06.87.14.77.99

Grésillon

Maison Culturelle de l'Espéranto
Château de Grésillon
49150 Baugé, France

site: <http://gresillon.org/>
courriel: kastelo@gresillon.org

Programme et bulletin d'inscription
dans le supplément spécifique
joint à ce numéro.



L'espéranto, langue de festival...

Nia Maro, 1ère édition du Festival des Cultures Méditerranéennes s'est tenu du 28 au 30 mai et présenté par La Compagnie Peut-être... , en partenariat avec la MJC de Vaux-en-Velin. Voici la présentation apparaissant sur le site tribunelyon.fr:

Nia Maro («Notre Mer» en espéranto) se propose d'aller à la rencontre des cultures des pays bordés par la Méditerranée. Il ne s'agit pas d'un festival de musique, de théâtre, de danse ou encore d'arts plastiques... c'est tout cela à la fois! Chaque édition sera centrée autour d'une discipline phare pour la découverte d'artistes de talents, locaux et internationaux. Nous avons choisi, pour la première édition, de porter notre attention sur la voix chantée. Les six concerts programmés seront entourés de stages, expositions, conférences, repas populaires... aux couleurs et saveurs de la Méditerranée!

Culture...

La Ville de Pierre est un roman originellement écrit en espéranto par **Anna Löwenstein** sorti en 1999, sous le titre **La Ŝtona Urbo**. Il vient d'être traduit en français par **Godeleine Logez et Ginette Martin**.

L'histoire commence dans l'Angleterre du 1er siècle. Bivana, une jeune celte, raconte son quotidien, son apprentissage pour apprendre à teindre les étoffes, moudre le grain, traire les vaches et s'occuper de son petit frère. ...

Se retrouvant à Rome, Bivana fut vendue comme esclave et commença son travail dans une villa à quelques kilomètres de Rome. ...

Sources: La Ŝtona Urbo. Wikipédia, l'encyclopédie libre. <http://fr.wikipedia.org>

Disponible au Service Librairie (voir ci-dessous) 330 p, 20 €, ainsi que la version originale (25 €)



Qu'est-ce que SAT ? Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail. www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ? L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT. www.sat-amikaro.org

Renseignements Pratiques

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claude.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Juin 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Ai-je payé pour 2010 mon adhésion à SAT-Amikaro ou mon abonnement à La Sago ?

Pour beaucoup de lecteurs, la réponse est un jeu du type : cochez la(les) case(s) correspondante(s) :

- Je ne m'en souviens pas
- Sûrement, mais je n'ai pas gardé de traces
- Non, j'attends toujours le rappel
- Oui, car je paye toujours avec ma réponse au référendum de fin d'année
- Bien sûr, j'ai payé, mais je ne sais pas pour quelle année
- Autre réponse (à préciser au verso)

Alors, le CA de SAT-Amikaro va vous aider à répondre à cette lancinante question.

Regardez le porte-adresse de votre revue (allez vite le récupérer dans votre poubelle à papiers si vous l'avez déjà prestement jeté !):

Sauf erreur à nous signaler, vous y verrez :

- votre N° d'adhérent (dans une rubrique «mode d'envoi»)
- «SAT-Amikara MEMBRO 2010» si vous avez payé votre adhésion 2010
- «ABONANTO 2010», si vous avez payé votre abonnement 2010
- «Vi ne pagis KOTIZON 2010», si vous avez un n° d'adhérent ou que vous êtes un ancien abonné et vous n'avez rien payé pour 2010

Ce dispositif automatique, et qui deviendra systématique, permettra d'économiser les lettres de rappel et l'énergie consacrée à leur préparation et envoi. En complément de ces informations, les correspondants locaux nous aideront cet été et cet automne à effectuer d'éventuelles relances téléphoniques.

Si vous n'êtes pas à jour et si vous désirez continuer de recevoir votre revue, merci de nous adresser votre cotisation ou de nous indiquer les difficultés que vous rencontrez.

Pour le CA, le trésorier :
Guy Martin.

Setece kuiru !

Ĉi numere, ferias Flora, kaj kuiradas la Bezieranoj. Jam ili preparas nin al la onta kongreso en Seto. Do, se vi planas kongresi tiam, estas forte konsilinde provi tiujn receptojn, por antaŭvidi, ĉu vi eltenos la tiean dieton...

Ora sparo kun aneto:

Kiam estas la sezono de la traïro de la oraj sparoj inter la lago *Thaux* kaj la maro, multegaj fiŝkaptistoj ellitiĝitas tre frue por havi la plej bonajn sidlokojn sur la kanala kajo en la kvartalo «*La Pointe Courte*» kaj instalas plurajn fiŝkanojn. Hejme ili kuiras la fiŝojn.

Por 6 personoj:

Unu sparo (1,5 kg) ; butero (50 g) ; 2 laktumoj de freŝa haringo ; olivoleo (1 dl) ;

Bukedeto da aneto aŭ kelkaj gutoj da anisbrando ; 1 ovoflavo ; petroselo, ajlo, cerefolio ; blanka seka vino.

Unue ni lavas la fiŝon, eltiras la intestojn tra la operkuloj. Tiel la ventro restas bonstata.

Delikate ni hakas la aneton (aŭ kelkajn gutojn ni aldonas) kun petroselo cerefolio kaj ajlo. Ni pistas la tuton kun la laktumoj de haringo, la butero kaj la ovoflavo.

Delikate ni metas tiun farĉon en la korpon de la fiŝo tra la operkuloj. En oleita kuirplado ni metas la fiŝon kaj aldonas salon kaj pipron. Ni ne forgesas fendi la dorson sur la ĉefa fiŝosto per tranĉilo. Ni priverŝas olivoleon sur la fiŝon kaj ni enforigas (T=7, 200°C) dum 15-20 minutoj.

Dum la kuirado ni abunde priverŝas per olea kulerpleno.

Ni prezentas la fiŝon en ĝia kuirplado sur la tablo. Kvin minutojn antaŭ la manĝo ni aldonas kelkajn kulerojn da blanka seka vino.

Seta Tjelo («Tielle») :

Por 6 personoj:

Malgrandaj polpoj (1kg) - Blanka seka vino.

Murbo: faruno (50g) ; gista paketo ; salo ; 4 kulerplenoj da oleo ; 1,5 glaso da varmeta akvo. (Eblas aĉeti la murbon).

Sauco: 4 tomatoj ; 1 dika cepo ; 2 ajleroj ; 2 malgrandaj paprikofruktoj ; oleo, salo, pipro kaj petroselo.

Ni preparas la murbon, ni faras pilkon kaj ni envolvas ĝin en tukon dum 2 horoj.

Ni purigas la polpojn kaj kuiras ilin dum 30 minutoj en salita akvo kun glaso da vino. Ni senhäuigas la kuiritajn polpojn per fingroj kaj

ni pecigas ilin per tondilo.

En oleita pato ni antaŭkuire subrostar la hakitan cepon. Ni aldonas ajlon, hakitan petroselon kaj pecojn da polpoj kaj ni dolĉe antaŭkuire subrostar la tuton.

Poste ni aldonas tranĉitajn tomatojn kaj la pistitajn paprikofruktojn. Dolĉe ni kuiras ĝis tio fariĝas bongusta saŭco.

En buterita muldilo ni etendas paston, ni verŝas la saŭcon kaj ni kovras per tavoligita pasto.

Por beligi la tjelon ni pikas per forko ĝian rondformon.

Ni verŝas iomete da oleo sur ĝi kaj ni enforigas ĝin dum 30 minutoj (T=7, 200°C).



Tiel estas la tjelo !

Ni manĝas ĝin varma, kun blanka seka vino.

La polpoj estas moluskoj, kiujn la Setaj loĝantoj nun manĝas sub individua rondforma kuko nomata «Tjelo». Tiu plado devenas el Italio. Estis la plado de la mizeruloj. Kiam la fiŝkaptistoj vendis sian produkton, ili konservis por si kaj siaj familioj la malgrandajn polpojn. Ili kuiris el ili raguon, kiun ili metis en torto.

Ankoraŭ nuntempe la plado malmulte kostas.

Sur la urbodoma placo staras statuo nomata polpo.

(Daŭrigota)

Redaktita, adaptita, tradukita
far C.B.E.

(Cercle Biterrois d'Espéranto)
laŭ

«Richesses et saveurs de l'Hérault»
de «Maguelonne»
(grupo de kamparaj virinoj).

Kontrolata socio (unua parto)

En la jaro 1975, la ministro pri la enlandaj aferoj *Michel Poniatowski* intencis informadike registri ĉiujn francojn sur la bazo de la numeroj de la sociala asekuro disponigotaj al la administraciaj kaj policaj servoj, sed pro kaŭzita skandalo la tiama prezidento *Valéry Giscard d'Estaing* preferis prokrasti la aferon.

Tri jarojn poste, la parlamento voĉdonis por leĝo titolita «Informadiko kaj Liberecoj», kiu oficialigis la informadikan registradon kaj kreis la Komisionon Nacian por Informadiko kaj Liberecoj - KNIL (franclingve *Commission nationale de l'informatique et des libertés - Cnil*) konsistantan el 17 membroj: 2 senatoroj, 2 deputitoj, 8 justicoficistoj kaj 5 tiel nomataj «kvalifikitaj eminentuloj» nomumitaj de la registaro. Tiuj komisionanoj elektis kiel prezidanton la senatanon *Alex Türk*, kiu apartenas al la Unuiĝo por Popola Movado (franclingve *Union pour un Mouvement Populaire - UMP*), kaj de februaro 2005 ĉiuj kvalifikitaj eminentuloj estas membroj aŭ subtenantoj de tiu partio.

De la kreo de la KNIL-o, ĉiuj registaroj preferis forteni ĝin de la plej tiklaj aferoj. Interalie en la jaro 1995, leĝo senigis ĝin je ĉia povo super la videokontrolado (franclingve *vidéosurveillance*). En la jaro 2004, rebakado de la leĝo pri Informadiko kaj Liberecoj deprenis de la KNIL-o trudajn povojn: ekzemple, la kreo de publiksekurecaj sliparoj ne estas plu submetita al ĝia rajtigo, sed nur al ĝia simpla konsultiĝa opinio. Por ke la KNIL-o ne petu okupiĝi pri la videokontrolado, amiko de la prezidento *Nicolas Sarkozy* estis nomumita prezidanto de iu «nacia komisiono por la videokontrolado».

En januaro 2009, sekve de 19 komisioj kiuj enketis pri la polica dokumentaro nomita *Stic*, la KNIL-o publikigis kulpigan raporton, kvankam ĝi estis doninta favoran opinion en la jaro 2000 ...

Kreita en la komenco de la 1980-aj jaroj, la Traktosistemo por Konstatitaj Leĝrompoj (franclingve *Système de traitement des infractions constatées - Stic*), kiu ekfunkciis sekrete, entenas proksimume 34 milionojn da nomoj. Ĝi inkluzivas sendistinge leĝrompintojn, viktimojn aŭ simplajn atestintojn. La dokumentoj estas konservataj en la daŭro de 40 jaroj koncerne la plej gravajn misfarojn. Normale, la nomo de ĉiuj personoj, kiuj profitis de tribunala senkulpigo (franclingve *relaxe*), malkondamno (franclingve *acquittement*), persekutoĉesiga ordono

(franclingve *non-lieu*) aŭ finmeto al afero (franclingve *classement sans suite*) pro nesufiĉaj akuzoj, devus foriĝi de tiu traktosistemo. Fakte, la prokuroroj ne liveras al la traktosistemo la utilajn informojn en la nombroj de 99,5 procentoj pri la malkondamnoj, 70 pri la tribunala senkulpigoj, 79 pri la finmetoj al aferoj. Enketisto mem ne povas nutri la traktosistemon; li devas uzi la servon de sia superulo kaj poste tiun de administra agento, kiu interpretas la protokolojn.

La traktosistemo por Konstatitaj Leĝrompoj estas uzata, por enketi pri la moraleco de personoj; homo, kies nomo troviĝas en ĝi, ne povas havi esperon ricevi la francan ŝtatanecon aŭ «delikategan» oficon.

La ĝendarmaro disponas dokumentaron nomatan *Judex*, kiu similas al la Traktosistemo por Konstatitaj Leĝrompoj kaj entenas 2,1 milionojn da nomoj, sed ankaŭ alian, kiu nomiĝas Alfabeto Sliparo por Informiĝo (franclingve *Fichier alphabétique de renseignements - FAR*) kaj enhavas 60 milionojn da nomoj. Tiu monstra dokumentaro fontas el slipetoj plenigitaj de ĝendarmoj sur ĉiu grupoloko (franclingve *brigade*): verdaj por la eksterlande naskiĝintoj, flavaj por la personoj naskiĝintaj sur ilia juridikcio, brunaj por ĉiuj aliaj. Tiu manfarata sliparo estas kontraŭleĝa kaj devus malaperi en la proksima estonteco.

En la jaro 2007, la Centra Direkcio de la Generala Informiĝado (franclingve *Direction centrale des Renseignements généraux - RG*) estis kolektinta 900.000 slipojn kaj enkalkulis 4.000 funkciulojn ŝarĝitajn per la tasko enketi pri ĉiuj partoj de la socio. La saman jaron, tiu direkcio malaperis, kaj fondiĝis 2 organizaĵoj: la Centra Direkcio de la Enlanda Informiĝado (franclingve *Direction centrale du renseignement intérieur - DCRI*) kaj la Subdirekcio de la Ĝenerala Informiĝado (franclingve *Sous-direction de l'information générale - Sdig*). La unua organizaĵo proprigis al si la dokumentojn en la

nombro de 20 procentoj koncerne la terorismojn kaj la ŝtatan sekurigon. La dua organizaĵo ricevis la ceteron kaj starigis dokumentaron sub la siglo Edvirsp (*Exploitation documentaire et valorisation de l'information relative à la sécurité publique*): Dokumenta Ekspluatado kaj Valorigado de la Informiĝado pri la Publika Sekureco, kies ekzisto ne estis publikigita en la Oficiala Gazeto. De sia flanko, la Centra Direkcio de la Enlanda Informiĝado kreis novan dokumentaron markitan «Nepublikigo pro ŝtatekreto» (franclingve *secret défense*) kaj tiel nomitan Alcentrigo de la Enlanda Informiĝado por la Sekureco de la Teritorio kaj la Naciaj Intereso (franclingve *Centralisation du renseignement intérieur pour la sécurité de territoire et les intérêts nationaux - Cristina*). En la pariza polica prefektejo ekzistas simila dokumentaro sub la nomo *Gesterext*.

La KNIL-o ne rajtas entrudiĝi en tiujn dokumentarojn kaj devas limigi sin per okazaj kontroloj. Por definitive meti la KNIL-on flanken, kreiĝis observcentro de la deliktokonduto (franclingve *Observatoire de la délinquance*), kies prezidanto estas eksa Granda Majstro de la Granda Oriento, ricevinto de katedro de kriminalologio ĉe la Nacia Centro de la Artoj kaj Teknikoj (franclingve *Centre National des arts et métiers - Cnam*), mastro de konsila socio por sekureco kaj precipe amiko de la prezidento *Nicolas Sarkozy*.

En junio 1998, sub la estro de la socialista ĉefministro *Lionel Jospin* la registaro kreis la Nacian Aŭtomatan Dokumentaron pri la Genetikaj Spuroj (franclingve *Fichier National automatique des empreintes génétiques - Fnaeg*), por registri la farintojn de seksaj krimoj, tio estas proksimume



Kiel starigi polican dosieron

10.000 personojn ĉiujare. De tiam la koncerna dokumentaro entenas kvazaŭ ĉiujn krimojn kaj deliktojn, kaj ĝi glutas sendistinge la nomojn de kondamnitaj kaj simplaj suspektitoj ekde la aĝo de 13 jaroj. Tiuj nomoj restas en la dokumentaro dum 40 jaroj koncerne la kondamnitajn kaj dum 25 jaroj koncerne la suspektitojn. Por la polico, pruvo per la deoksiribonuklea acido (franclingve *acide désoxyribonucléique - ADN*) anstataŭas konfesojn; tio ne konsideras, ke malbonfarintoj povas konfuzi spuraron, disjetante post si cigaredstumpojn aŭ harojn de alia persono.

Kelkajn tagojn, post kiam la prezidento *Nicolas Sarkozy* estis elektita, la 15an de majo 2007 dekreto de la ĉefministro rajtigis krei dokumentaron pri la handikapuloj, kiuj entenas nomojn, antaŭnomojn, aĝojn, medicinajn dosierojn, naciecojn, datojn de eniroj en Francion ktp. Origine tiu dokumentaro havis la celon faciligi la funkciadon de la departementaj domoj por handikapuloj kreitaj laŭ leĝo farita la 11an de februaro 2005 kaj favoranta egalecon de rajtoj kaj ŝancoj por la koncernaj personoj, sed ĝi povas esti utiligata, por kontroli la regulecon de ilia restado en Francio. La donitaĵoj de tiu dokumentaro estas konservataj dum 5 jaroj post la lasta modifo en dosiero.

Sur la biometriaj identigaj kartoj, la fotografiaĵo en cifereca formato (franclingve *format numérique*) troviĝas apud blato (franclingve *puce*), kiu liveras ĉion pri la identeco de persono: vizaĝon, daton de naskiĝo, pezon, staturon, adreson, gepatrojn, idaron kaj aliajn informojn tenatajn en komputilo. Por scii pri la vojoj de persono, sufiĉas, ke oni serĉu la taŭgan bildon en tiu datenbanko, kaj ke oni komparu ĝin kun tiuj registritaj de kameraoj de videokontrolado.

(daŭrigota)
Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de broŝuro titolita «*Je te vois!*» *Comment nous sommes tous sous surveillance*, aperinta en junio 2009 kaj apartenanta al la kolekto nomata *Les dossiers du Canard* (173, rue Saint-Honoré, 75001 Paris)

Eĥoj el Hiliono

Kobolda protokolo SAT-Amikara kongreso en Hiliono je la 3a – 6a de aprilo 2010.

Unue mi prezentas min. Mi nomiĝas «La Kolboldo» kaj naskiĝis antaŭ nur ok monatoj dank' al la krajonstrekoj de Stefano Lemarchand. Mi ne estas denaska esperantisto sed ĉiuj OKKanoj tuj adoptis min. Estis mia unua sperto kaj partopreno en SAT-Amikara kongreso ĉe la kultura centro «Georges Palante» en Hiliono apud San-Briego (22).

Pro la fakto ke ĉie, samtempe, mi ĉeestis, mi povas, legende, rakonti la tuton! Mi tre fieris esti elektita kiel kongresmonunuo kaj eĉ ekster la kongresejo, en kafejoj. Stranga ideo: OKK klonis min; ĉe la trinkejo kia gaja spontana etoso! Ni koboldfamilie vivis kune verdaj kaj ruĝaj. Dank' al klonado mi povis partopreni la tutajn debatojn, spektaklojn, ekskursojn... Multaj homoj ĵaluzis min pro tio! Ili malfacile devis elekti inter la programeroj.

Oficiala Malfermo

Post bonveniga parolado kaj samideanaj salutvortoj de la municipo kaj organizantoj, bretona muzikistaro «Mervili» komencis inici nin al bretonaj dancoj kaj kanzonoj ĝis noktomezo. Mi miris ekvidi ian virineton, kvazaŭ koboldino, preskaŭ 90-jaraĝa kaj komprenis ke ŝi vere meritita esti nomata «honorprezidantino» Gaby. Tiuokaze, mi plonĝis en ŝian bukedon por flari la 64 florojn, kiujn ŝi ricevis rilate al ŝiaj 64 jaroj en esperantujo. Antaŭ la debatoj mi, bretona koboldo, amuziĝis dum lingvo-festivaleta aŭskultante la bretonajn kaj esperantajn balbutaĵojn.

Riĉa programo

Sabaton la 3an de aprilo, frumatene, la amaso de zumantaj kongresanoj unue timigis min, imagu pli ol 230 alvenintoj! Kiel trablovoj tra la kongreshalo! Enpoŝe, enmane kaŝita mi malkovris riĉan programon kaj ĉefe dediĉita al ĉeftemo: Ni krizkontraŭu!

En kunvenoj pri SAT-Amikaro, mi ne ĉion komprenis, ne pro la lingvo, sed pro debatoj, kiuj rilatis al historio de la asocio. Kelkfoje, mi provis siesti, ekrunki dum longa parolado, sed viglaj demandoj, eĉ krioj tuj vekis min. Tamen, mi konstatis ke la partoprenintoj ŝajnis sufiĉe gajaj post tiuj forumoj kaj ĝeneralaj asembleoj. Dume, mi vidis kameraon de Jean-Dominique

Gautier kaj Bernard Sanderre, kiuj preparas dokumentan filmon pri Esperanto. En iu kafejo, mi strebis aperi kiel montriĝema steleto tutmonda. Abundis prelegoj kaj debatoj kun lokaj asocioj, kie ĉiufoje averaĝe 50 kongresanoj aŭ vizitantoj partoprenis, interesiĝis kaj debatis eĉ vigle. La prelego de Cyrille Hurstel kaj Bernard Lagrange estis filmita de Maurice Gourichon, kiu postsomere preparos rete elŝuteblan version.

La artaj vesperoj

La vesperoj estis dediĉitaj al distraj kaj kulturaj programoj, libere malfermitaj al neesperantista publiko. Tiele, ni akceptis ĉirkaŭ 80 homojn el proksimaĵo. Altnivele gitarkoncertis por ni Lino Markovo, eĉ se li klaŭne konfesis ke li forgesis sian programon. Dum la korusa Interkanta vespero (Kanto Ĝenerala), ni povis percepti kolorajn ritmajn muzikojn, kaj ke «esperanto», kiu disponas varian kaj riĉan kulturon, kapablas kunigi 60 gemuzikistojn/kantistojn sur scenejo por la sama projekto. Tuj kaptis la korojn de ĉiuj aŭskultantoj per siaj bonhumuraj kaj viglaj kantoj plane akompanataj per trafaj spritaĵoj: Gijomo. Mi malkovris lian talenton kaj bedaŭris, kiel multaj spektantoj ke li ne plukantis. Mi subiris scenejon por spioni la Maretanojn el Vannes kiuj prezentis amuzan teatraĵon, sed «mi revenos poste!».

Ekskursoj

La kongreso inkluzivis plurajn duontagajn kaj tuttagajn ekskursojn por malkovri mian naskan regionon, tra mia departemento. Sperte ĉiĉeronis: Jean-Claude Dubois, Philippe Stride, Bernadette Lemarchand, Laurent Peuch, Karlo Burlot', Alain kaj Marylène. Amaso da ĉeestantoj partoprenis sub sunombrelo. Eĉ, en katedralo de San-Briego, iu italo, gregorie ĉantanta, klaŭnkobolde imitis min, komentante vidindaĵojn.

Kion mi preferis el la 4-taga kongreso? Farse flirti.

Pro mia eteco, neniu rimarkis ke mi ĉeestis ĉiujn tablojn, flarante bonajn odorojn kaj diskrete pikplukante ekokultivitajn frandajn nutraĵojn el teleroj dank' al la arto de Nassima kaj ŝia juna skipo de «Cosmoculina». Post noktomezo, kiam Franjo komponis sekretan kodon ĉe la kongresejo por ĝin ŝloŝi, trankvile mi preterflugis la tutkongresejon kaj ekvidis fantoman kongresanon, kiu nudpiede lasis spurojn sur kahelaro. Mi miris pro la nekredebla impona libro-servo de SAT-Amikaro kaj ankaŭ ĝuis allogan regionan libro-prezenton; kvankam la libroj kutime





mutas, ĉi-nokte ili rakontis ke ili estas granda parto de la esperantista kultura vivo kaj ĝojis ricevi tiom da vizitantoj. Certe, kelkfoje, Flo retrovis misordon en sia budo disko-servo. Mi konfesas ke mi kulpis pri tio. Imagu la «tri koboldoj»-n tamtame afrikumantaj «Fek'al Esperanto!» Paf! Klik! Apud moskvaj vesperoj tuj... De tempo al tempo, mi amuziĝis kaj kunkludis: mi miksiĝis kun infanoj aŭ saltis en la hararon de Flora Markov, kiu zorgis por infanan programeton.

**Tradukis el la kobolda lingvo
OKK-anoj:
Franjo, Laurent, Alain, Guy,
Marie-Pierre, Amapola.**

Eĥoj el Hiliono plu...

Koboldaj kafejoj en Hiliono

Nia firmaintenco malfermi la kongreson al publiko interalie konkretiĝis per kontaktoj kun komercistoj en Hiliono.

De longtempe ni parolis pri la projekto en la mitul-restoracio «*Le bistrot à moules*». Sed, kiam ni kreis la monunuon «koboldo», ni tuj proponis al ĉiuj kafejoj en la hiliona centro akcepti tian monon de la kongresanoj: ili varme konsentis kaj fakte ricevis vizitantojn.

Plie, kiam ni preparis la kongresejon la antaŭan tagon, ĉirkaŭ la 18a, du eminentuloj el la unuaj kongresanoj

iris mendi 20 vespermanĝojn! La respondeculoj de la restoracio penis kredi ilin, sed tuj ekaktivis por nin prepari la unuajn mitulojn en la sezono.

Fakte, iom post iom ni preterpasis la eksteran ardezon, sur kiu la menuo esperante fiere aperis. Finfine ĉeestis 24 esperantistoj kaj niaj gastigantoj devis rifuzi klientojn! Varma etoso en la salono.

Pro tiu anekdoto, la OKK ne povis eviti fari la bilancan kunvenon en tiu restoracio, kie ni refoje ĝuis diversecon de mitulaj pladoj.

Bonan apetiton!

Guy Martin

La trinkejo

«La trinkejo estas renkontejo, do estus agrable por la kongresanoj se ĝi estus malfermita la tutan tagon» konsilis al ni, nia fetiĉo, La Koboldo.

Do multaj ŝatis interkonatiĝi, interŝanĝi, trovi amikojn kaj trinki kune.

Malfeliĉe, la bierpumpilo ne bone funkciis. Pierre la ĉefkelnero, elŝiris siajn lastajn blankajn harojn! Tro da ŝaŭmo, ne sufiĉe da likvo! Li pensis: «mi ne estas sufiĉe sperta, vere, mi estas nulo!»

Amikoj proponis helpi lin, estis same, ili ne sukcesis pli bone. Atendante siajn trinkaĵojn, antaŭ la bufedo, bierŝatantoj salivumis malpacience, eble ili pensis: «kiam la bierglaso estos preta, la prelego komenciĝos, aŭ estos malfrue por iri al la ekskursoj». Do la sekvantaj tagojn, multaj preferis trinki cidron aŭ pomsukon. Mi opinias ke nia Koboldo intervenis en tiu afero ĉar li deziris ke la kongresanoj gustumu niajn bonajn bretonajn trinkaĵojn.

Ankoraŭ alia problemeto ĉe la trinkejo: lunde mankis timianinfuzajoj. Kial? Tute

simple, la antaŭan tagon la korusanoj de «Interkant» priŝtelis ilin antaŭ la koncerto por klarigi siajn voĉojn. Dank' al timianinfuzajoj, la koncerto estis perfekta! (Jen malkaŝita, la interkanta sekreto).

Feliĉe estis ankoraŭ kafo, bretona kafo. Tiu kafo multe plaĉis al ĉiuj krom al nia kara Karlo, ŝatanto de itala kafo. Por li, ĝi ne estis sufiĉe forta. Ĉu Karlo bonvolas klarigi kial li aldonis tri sukerpecojn en sian tason?

Pierre kaj Rolande Nedellec.

Kanajla koboldo ankoraŭ frapis malantaŭ la kurteno!

Dum la teatraĵo «La Atendejo» de la Maretanoj el Vannes, Lino kaj mi devis muzike akompani malantaŭ la scenekranego.

Krom la fakto ke ni ŝovis la muzikinstrumentojn 50 centimetrojn pli foren, ni tute bone sekvis la konsilojn de la teknikisto Jean-Luc... «la kurteno (tra) pasos inter vi du kiam necese»

Je la preskaŭa fino de la teatraĵo, necesis malfermi la kurtenon. Kredu nin, ĝi estas kaj rapida, kaj efika, kaj peza! Certe Lino kulpis, ĉar la dorson li turnis al ĝi.

Du sekundojn poste Lino malaperis. La kurteno turbe turnadis lin, mumiigis lin kiel faraonon! Kiel fari? Krome ĝi forŝtelis, la pupitron kaj la partiturojn. En normala situacio, faraono nepre konservas siajn plej ŝatatajn objektojn apud si por la eterneco. Feliĉe, li tute ne mortis kaj kvarpiede reaperis el sub la kurteno. Fu! Jam estis tempo, por akompani..., kion? Ĉiuj partituroj kovris parton de la scenejo, bonŝance ni havas bonan memoron.

Kredu min, sperto ne instruas!

La kurteno faris pliajn vojaĝojn, kaj foje forĵetis Lino-n (plen) rekte kontraŭ la muron funde de la scenejo. Refoje Lino ne forgesis pupitron kaj partiturojn.



La povrulo, al mi, ĉi-foje, li aspektis kiel testudo dorse falinta, kaj li diris firme tenante la gitaron:

- Mia gitaro Franjo, bonvolu helpi al mi!

- Ne, Lino, mi tute ne kapablas, se mi stariĝus por helpi al vi, certe marĉeto aperus sub mia piantabureto!

La lasta vorto alfalis al nia kara kurteno, kiu, en lasta vojaĝo, helpis al Lino restariĝi. Ni ekridegis dum pluraj horoj poste kaj ankoraŭ nun rakontante tiun anekdoton.

Franjo



MALANTAŬ LA SCENEJO



Esperantistoj aktivas

Sainte-Foy-La-Grande (33)



La Esperanto-asocio en Sainte Foy la Grande (Francio), unuafoje organizis Internacian Konkurson por Filmetoj. Ĝi celas reliefigon de tiu arto en Esperanto tra la mondo.

- La filmetoj, nepre en Esperanto (originale aŭ tradukite), povas daŭri ĝis 15 minutojn.
- La bildkvalito devas esti sufiĉa por larĝa ekrano (filmado per poŝtelefono ĝenerale ne tre bone taŭgas).
- Ili povas aparteni al unu aŭ pluraj jenaj kategorioj: aktualaĵoj, (mem)biografio, dokumenta filmo, dublado en Esperanto, fikcio, intervjuo, memprezento, muziko, porinfana filmo, teatraĵo, movbildoj (ĉiaspecaj: desegnita aŭ/kaj komputila filmo, ktp), varbado, ktp
- Estis pritaksataj: filmado, scenaro, dialogoj, lingvo, prononcado, enscenigo, aktorado, muziko, sonbendo, kreivo, ktp.

Prezento okazis la 15an de majo 2010.

Jen la rezultoj de nia konkurseto. Por ni, estis tre malfacile elekti, ĉiuj kune kontribuis al komuna kreado. Ĉiuj filmoj postulis tempon, laboron, ideojn, kompetentojn, kaj kreivon.

Ni, kiel ĵurianoj, devas ankaŭ trejniĝi, lerni kiel plej efike organizi tian renkontiĝon. Ĝi venontjare estu pli videbla, pli frue en la sezono por ke ĉiuj havu tempon prezenti sian filmon. Ni ankaŭ devas trovi solvon, por ke la interretanoj povu rekte spekti ĉiujn filmojn kaj doni sian opinion. Kelkaj el la kandidatoj ne povis ĝustatempe proponi grandformatan filmon. Ni invitas ilin kandidatiĝi por la venonta jaro. Simbolaj premioj kaj diplomoj estos senditaj ekde kiam ili estos finpreparitaj.

Gratulojn al ĉiuj, kaj koran dankon pro kontribuo al riĉa kaj interesa elektableco!



Unua IkoFo : Internacia Konkurso por Filmetoj

PREMIO DE LA PUBLIKO

Kiel varbi Esperanton (Rogener Pavinski) - Humuro, movado
 En Bona Espero (Ĵomart, Nataŝa, Karina) - muzikfilmo
 Sagŭio (Emilio Cid) - Dokumenta filmo
 Kaj Tiel Plu (Kaj Tiel Plu kaj Vinilkosmo) - Muzikfilmo, intervjuo
 Podkasto por vi (Simmon Keith) - Reklamo, bildfilmo, muzikfilmo
 Mejzi Ŝpruc (Jakob Nordfolk) - Dublado
 Jacques Ivart (Vinilkosmo) - Muzikfilmo, intervjuo
 Tatua papili' (Inicialo DC kaj Roger Borges) - Muzikfilmo
 Jose Antonio Vergara (Claude Labetaa) - Intervjuo
 Esperanto estas (1 ĉap)... (Peter Balaz) - Dokumenta filmo, movado
 Supernova (Rogener Pavinski) - Muzikfilmo
 La Pafklik (La Pafklik kaj Vinilkosmo) - Muzikfilmo
 Sentiments (Damien Frebourg) - Dokumenta filmo
 Portreto de Zamenhof (Vagnero) Dokumenta filmo
 Vizito de Szolnok (Claude Labetaa) - Dokumenta filmo
 Vizito de Paola en Kemper (Loïc Roussain) - Dokumenta filmo
 Mikaelo Ĝispling (Gian Piero Savio) - Dokumenta filmo
 Ekologia turismo (Robin Beto en kongreso, Vito Markov) - Humuro

APARTAJ MENCIOJ LAŬ KRITERIOJ:

IDEO - Kiel varbi Esperanton, Sagŭio,
 SCENARIO - Esperanto estas, Kiel varbi Esperanton, Sagŭio
 DIALOGOJ - Kiel varbi, Sagŭio, Sentiments
 LINGVO - Gian Piero Savio, Peter Balaz, Claude Labetaa, Robin Beto, Damien Frebourg,
 MUNTADO - Vinilkosmo, Peter Balaz, Esperanto estas, kiel varbi, Damien Frebourg, Vizito de Szolnok, Gian Piero Savio,
 AKTORADO - Kiel varbi Esperanton, Esperanto estas,
 SONBENDO - Vinilkosmo, Roger Borges, Ĵomart k. Nataŝa,
 FILMADO, BILDOJ - Simmon Keith, Vinilkosmo, Roger Borges, Peter Balaz, Claude Labetaa, Damien Frebourg,

KATEGORIOJ:

DOKUMENTA FILMO - Emilio Cid, Peter Balaz, Claude Labetaa, Gian Piero Savio, Loïc Roussain, portreto
 DUBLADO - Jakob Nordfolk
 MUZIKFILMO - Vinilkosmo, Roger Borges, Ĵomart kaj Nataŝa, Rogener Pavinsky
 REKLAMO - Simmon Keith, Vinilkosmo
 BILDFILMO - Simmon Keith
 INTERVJUO - Vinilkosmo, Gian Piero Savio, Claude Labetaa,
 HUMURO - Kiel varbi, Ekologia turismo
 MOVADO - Esperanto estas, Kiel varbi, Claude Labetaa (intervjuo de A. Vergara)

Sugestojn, rimarkojn ni kore bonvenigas!



la ĵurio de IkoFo
Raportas Mari-elen' Dezer'

«simbolaj premioj»

Tamen, ne tiom simbolaj se juĝi la mane faritajn trofeojn, kiujn oni ŝuldas al Coline Munoz.

Ŝajnante indiferenta,
rigardu malantaŭen...

ŝajnas, ke oni
gvatsekvas nin
...



Unua de majo, dise ĉie...



SAT-Amikaraj flugfolioj pri internacia solidareco estis disdonitaj en Parizo, San-Briego (vd fotojn) kaj Liono. Kamaradoj ankaŭ manifestaciis en Lomeo (vd fotojn), kaj eble aliaj lokoj, sed pri tio bonvolu informi nin!

Vinko

